Año IV (N.º 46)

BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Núm. 10

OCTUBRE 1952

RUZAFA, 7 VALENCIA (ESPAÑA)

NUESTRA TAREA

Entre los prejuicios extendidos más allá de nuestras fronteras sobre nuestra manera de ser, tal vez el más unánimemente sustentado sea el de nuestra proverbial indolencia. Y no se necesita ser un lince para conocer, en el semblante de nuestros visitantes, el derrumbamiento de ese castillo de juicios apriorísticos, que, partiendo de la «leyenda negra» y siguiendo por el derrotero de la España de pandereta, llega, en los más informados, a concedernos una credencial de gente de tipo corriente, pero con un lastre muy pesado de «far niente», envuelto en jacarandosa melodía de guitarras y castañuelas.

Y eso, que ocurre a los turistas que ignoran la sonora lengua castellana, se da con mayor motivo en los que, por conocer nuestro idioma auxiliar, pueden llegar al fondo de nuestros pensamientos, enterándose cumplidamente de nuestra íntima manera de vivir.

Ese fenómeno se ha producido con creces con motivo del reciente Congreso de Esperanto en Valencia. Y los más sinceros nos han repetido, una y mil veces, su gran sorpresa por el aspecto activo de nuestro país, por la sencilla amabilidad de las gentes, especialmente de las más humildes, y por la, según ellos, febril organización de los dirigentes del esperantismo español. Con sincero halago recibimos los parabienes que a nuestro país se dirigen. Los que a nosotros van, los recogemos porque, aunque indirectamente, también recaen sobre el buen nombre de nuestra patria; con tal motivo, hemos de cuidar con esmero de no perder y, a ser posible, aumentar tan buen criterio.

Otra de las desagradables etiquetas con que nos suelen catalogar, es la de no ser personas prácticas. Se nos concede fantasía, imaginación y hasta talento. Pero se nos niega la constancia, la deducción y ese tesón que mantiene tenso el esfuerzo durante tiempo y más tiempo, hasta conseguir el objetivo que se trazó inicialmente. Para deshacer esa posible opinión, en los que pudieran sustentarla, nos cabe a los esperantistas españoles la ingente tarea de llevar a cabo las conclusiones de nues.ro último Congreso.

Al solicitar de las autoridades académicas el apoyo necesario para la enseñanza del Esperanto en los medios escolares, pretendemos que se tenga en cuenta la utilidad que puede reportar este maravilloso medio de relación, entre gente de distinto idioma, estudiándose la manera de su introducción en las Escuelas Normales, para que de ellas salgan, en breve plazo, maestros capacitados en tan interesante disciplina pedagógica. Caso de no existir profesorado oficial, preparado para ello, nuestra Federación podría proporcionar interinamente la capacidad y la experiencia de sus más valiosos elementos, que con su acostumbrada abnegación y altruismo serían un ejemplo del tesón de los españoles, en el cumplimiento de elevados y nobles deberes. Creemos sinceramente que es necesario plantear esas premisas, antes de pretender que se instruya el Esperanto incluso en las escuelas primarias, que es la gran meta de todos nuestros esfuerzos.

Estamos acostumbrados a rebatir con argumentos lógicos los ataques injustos y las interpretaciones equivocadas; por eso mismo, cuando el denostador tiene talla y categoría, cual ocurre con la Academia de la Lengua, que define torcidamente al Esperanto en su Diccionario, a nadie le parecerá extraño tampoco que volvamos por la verdad y solicitemos la justa rectificación. Esperamos, pues, que queden las cosas como deben. A Dios lo que es de Dios, y al Esperanto... la concreta definición que le corresponde, en su papel ideal de idioma auxiliar. ¡Nada más, pero nada menos!...

Por la defensa y cumplimiento de las decisiones congresales, se ha de medir el fervor de los esperantistas españoles. Pero no olvidemos que para pedir es preciso merecer; y el merecimiento, por nuestra parte, significa: trabajo en la difusión y en la enseñanza, aportación de peculio y de tiempo, utilización de los conocimientos adquiridos, manteniendo correspondencia metódica con esperantistas extranjeros y colaborando muy intensamente en las distintas actividades de nuestra Federación.

Demostremos a todos que el esperantismo español, aunque débil aún por sus componentes, es fuerte, no obstante, por su seriedad en el presente y rico por su fé en el porvenir.

WK/108/1/77

HISPANA KRONIKO

VIGLA AKTIVECO KAJ PUBLIKA LABOREMO DE LA KATALUNAJ RONDOJ

MOYÁ.—La 15an de Aŭgusto, ĉefa festo en ĉi tiu urbeto, oni inaŭguris la zorge preparitan ekspozicion, kiun sub titolo: LA MONDO ESTAS POPOLO aranĝis la tieaj samideanoj en la ejo de la gazeto «La Tosca». Ties direktoro, pastro J. Estevadeordal, prezentis la elmontron al la urbaj aŭtoritatoj, je kies nomo dankis la urbestro S-ro M. Villarrubia. Nia fervora kaj ĉiam preta samideano R. Molera, je nomo de la organizintoj, detale faris klarigojn pri ĉiuj sekcioj de la belega instalaĵo, vera muzeo por la materialo ricevita de la tuta mondo, dum preskaŭ unu jaro. La tiucelaj klopodoj estis efikaj, ĉar tiu materialo estis mire rigardata de la tuta loĝantaro kaj multaj foranoj. Ĉiu vizitanto ricevis reklamilon en formo de plaĉa broŝureto. La 24a de Aŭgusto okazis tie la monata kunveno de la grupoj el la provinco de Barcelono; ĉeestis proksimume 70 geamikoj el jenaj urboj: Barcelono, Manresa, Sabadell, Tarrasa, Vich, Sardanyola, San Feliu de Codinas, Roda de Ter kaj Tarradell. Oni faris kolektivan viziton al la ekspozicio kaj al la urbaj vidindaĵoj, kaj oni subskribis en la albumo de la Grupo. En la laborkunsido, oni studis la decidojn de la Kongreso en Valencio, precipe la gravan taskon pri la eldono de la Hispana-Esperanta Vortaro.

BARCELONO.—La Esperanto-Grupo de Kooperativo «La Vanguardia Obrera» en la grava kvartalo Horta ankaŭ aranĝis belan ekspozicion, dum lastaj tagoj de Septembro, kiel antaŭaĵon kaj malfermon de kurso. La 28an, dimanĉe, okazis plensukcesa arta Vespero, kun interveno de pluraj artistoj, inter ili la famkonata tenoro E. Vendrell kaj nia samideano R. S. Güell. La publiko de tiu populara kvartalo ŝtopis la salonon kaj agrable ĝuis la festivalon, kune kun pli ol ducent esperantistoj, venintaj el diversaj katalunaj urboj por la kutima monata kunveno, kiu okazis dum intermezo de la festo kaj rendevuos venontfoje en Tarrasa.

SANTA COLOMA DE GRAMANET.—Fondiĝis Esperanto-Fako ĉe «Centro Excursionista Puigcastellar» (strato San José, 8), kiu tuj komencis jam labori, gajninte la intereson de la publiko, kiu certe liveros multajn lernantoj por la kurso, kiu baldaŭ komenciĝos kaj sukcese daŭros dum la necesa tempo.

TARRASA.-La diligenta Esperanto-Fako de Ĥora Societo «Juventud Tarrasense» ne haltas en sia laboro, neniel forgesante, ke Tarrasa estis gastama rendevuejo por la unua postmilita hispana Kongreso. *Nur* kvar kursoj samtempe funkcios komence de Oktobro, sub la gvido de S-roj Aris kaj Chaler: Elementa, Perfektiga, Praktika kaj Speciala por infanoj. Krom tio, ĉiusabate okazas treege agrablaj interbabiladetoj.

Antaŭen en tiu direkto, karaj geamikoj! Ni fosu mem nian sulkon!

FEDERACIÓN ESPERANTISTA ESPAÑOLA

SECCIÓN DE INFORMACIÓN Y COORDINACIÓN

Por acuerdo de la Junta Directiva, se ha creado esta Sección, integrada por Delegados locales que servirán de enlace, a fin de mantener una conexión constante entre la Federación y los distintos grupos esperantistas que actualmente existen en España.

Como encargado de esta Sección, ha sido elegido el competente samideano de Sabadell don Vicente Hernández Llusera, con quien los Delegados deberán relacionarse; para lo cual rogamos a todos los grupos que nombren su delegado, eligiendo a uno de sus miembros más activos. Donde no exista grupo constituído debe haber también Delegado local.

En las poblaciones en que no haya más que un esperantista, éste será el Delegado.

Será misión de los Delegados, mandar periódicamente a la Federación, por medio de esta Sección, toda clase de informes y sugerencias, velando además por el cumplimiento de las orientaciones dima antes de la Federación, la cual dará normas sobre las tareas de propaganda y organización, para que una y otra se realicen de manera uniforme y coordinada, llevando al plano nacional, para su posible realización, las iniciativas locales.

Esperamos una decidida colaboración, siendo así que del entusiasmo de los Delegados dependerá, en gran parte, el floreciente desenvolvimiento de la Federación y, por lo tanto, del Esperanto en nuestro país.

Valencia 9 de Octubre de 1952.
El Secretario, VICENTE SANTAMARIA

Escríbase seguidamente a: Vicente Hernández Llusera - Av. Ejército Español, 59 - SABADELL (Barcelona)

La gloro ne dependas de la propra sindonemo, kiu ordinare estas nevidebla, sed de la ekstera dekoracio.
PAUL VALERY.

KORAN DANKON!

Je nomo de ĉiuj gepartoprenintoj en la Esperanto-karavano de S-ro Friis, el Aabyhoj (Danlando) mi deziras esprimi, pere de BOLETIN, plej sincerajn dankojn al la karaj hispanaj geamikoj, pro ilia abunde montritaj afableco, bonkoreco kaj gastamo.

Unuavice estu nia danko por S-ro F. Montserrat, kiu en vere unika maniero ĉiel nin helpis. Neniam ni forgesos lian afablecon kaj daŭran bonhumoron, dum la vojaĝgvidado. La samideanoj el Barcelono tre bele agrabligis nian restadon, arangante viziton al la belega Urbodomo, ĉirkaŭirojn en la urbo kaj belan feston en la Koopera Domo, kie ni ĝuis ege agrablan vesperon.

Specialan dankon ni esprimas al la karaj geamikoj en la urboj Ripollet, Sardanyola kaj Sabadell. Ilia varma simpatio kaj gastamo restos daŭre en nia memoro, pro la belaj horoj tie pasigitaj.

En Valencio, Madrido kaj San Sebastian ni ĝuis neforgeseblajn tagojn. La kunesto kun fidelaj samideanoj ege plezurigis la restadon; dank' al ili, ni povis bone ekkoni la landon kaj la popolon, sukcesinte penetri iom en la ĉiutagan vivon, kune kun la hispanaj zamenhofanoj, kiuj, malgraŭ sia izoliteco, parolas la lingvon flue kaj elegante.

Ili sciu, ke kun premaj koroj ni adiaŭis ilin, esperante, ke la estonteco ebligos al ni novan viziton. La naŭ-taga restado inter ili donis al ni plej valorajn impresojn; tial, ni revenis hejmen plej kuraĝigitaj kaj tre dankaj al la tuta hispana samideanaro, kun aparta mencio al S-ro Juan Bosch pro lia zorga kaj lerta antaŭpreparo.

Antaŭen, do, senhalte; viaj sukcesoj ankaŭ estas niaj!

O. THORMODSEN
Boks 132 - Haugesund (Norvegio)

AKADEMIO DE ESPERANTO

OFICIALIGO DE LA SUFIKSO -END

Post pristudo kaj voĉdonado, la Akademio decidis oficialigi la sufikson -END' kun la difino:

«Kiu devas esti --ata, pro materia aŭ morala trudo; kiun oni estas devigata --i»

Ir. J. R. G. ISBRUCKER - Prezidanto

SFINKSA ANGULETO

MISTERAJ KARTETOJ

ESTRADO	IMPOSTO
BU - BU - BU N	BU - BU - BU T

Oni akceptos solvojn, por la premio, ĝis 22. Novembro

SOLVO DE LA **PSIKOLOGIA STUDO** EN LA PASINTA NUMERO

1: 45 jaroj — 2: 18 jaroj — 3: 65 jaroj — 4: 30 jaroj

RIDETANTAJ GUTOJ

Inter infanoj;

—Ĉu vi kapablas nomi la sep tagojn de la semajno, ne dirante la kutimajn nomojn: lundo, mardo, merkredo, k. t. p.?

—Ho, tio ne eblas.

—Jes, tre facile; jen: praantaŭhieraŭ, antaŭhieraŭ, hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ, postmorgaŭ kaj prapostmorgaŭ.

—

Inter ŝtelistoj:

—...Kaj, kiam ĵus mi ŝtelis la horloĝon al kunvojaĝanto, li diris al mi: «Ĉu vi deziras scii, kioma hora estas nun? La unua!» kaj li donis al mi pugnobaton.

—Tre bona sorto; ĉar, se anstataŭ la unua estus la dekdua...

JOSE MARTINEZ (Zaragozo)

LAŬDO AL LA LIBRO

Bona libro estas kvazaŭ lumo ĉe la koro, spegulo de la homo, majstro de virto, ponardo por la malbono, krono por la saĝuloj, distro dum niaj vojaĝoj, amiko plej intima en nia hejmo, akompano de la malsanuloj, fidela kolego kaj saĝa konsilanto de la aŭtoritato, bonodora skatoleto de elokventeco, printempa ĝardeno, herbejo plenplena de floretoj, arkivo de la memoro kaj bildo de la vivo. Voku ĝin, kaj rapide ĝi sin prezentos. Se oni komisias ion al ĝi, tuj ĝi plenumos la servon ĉiam kompleze kaj volonte. Se oni ion demandas al ĝi, baldaŭ ĝi respondos unu kaj multajn fojojn. Ĝi malkovras la kaŝitajn aferojn, heligas la mallumon kaj forigas la dubojn. La libro estas, por honesta homo, armilo kontraŭ la perfido, ĉar ĝi hardas la animon kaj kreskigas la havon, kiel fonto de prudento kaj intendanto de la ekonomio.

El antikva latina aŭtoro
tradukis **JULIO TARIN** (Cheste)

INTER LA PROZO DE LA ESPERANTISTA GAZETARO

Inter mia lasta babilo kaj hodiaŭ, staras la grava epizodo de la Hispana Kongreso, kies reflektoj ankoraŭ brilas nun kun daŭra efiko, por montri la ĝustan direkton. Tute nerimarkite, mi travivis ĉiujn okazaĵojn kaj povis konstati, ke la esperantista popolo estas viva ekzemplo de civitaneco, kiel modelo de konscia amaso, en kiu ĉiuj eroj el ĝia konsisto libere rezonas kaj saĝe argumentas, laŭ propra opinio; neniel forgesante, tamen, ke plej valoras la forto de la tuto por sukcesa atingo de la komunaj aspiroj. Kaj tiuj aspiroj, en karesa rondo, venas ĝis mia izolejo, por ligi min kun la ceteraj membroj de la hispana familio.

Sekve, do, kiel aktiva parto de tiel admirinda komunumo, aktive mi devas labori anstataŭ ol klaĉi banale. Tre dika fariĝis, dum mia ferio, la staplo da akumuliĝintaj gazetoj; vere, mi ne scias kiel komenci, kvankam nepre, tute nepre kaj agrable, mi devas komenci... Nu, estu tiel:

AMERIKA ESPERANTISTO helpas min volonte, en la enkonduko, per bona kroniko kaj bela foto de la Kongreso de E. A. N. A. en Sacramento; kelkaj konataj vizaĝoj estas videblaj. Mi salutas ilin, dezirante sukceson al la klopodoj por nia lingvo, interne de la vasta usona teritorio. MEZAMERIKA REVUO estas la unua numero de brava kolego en Gvatemalo; rozkolora kovrilo, kun mapo de la mezamerikaj landoj, aspektas plaĉe kiel promeso pri la bona enhavo, kiu interne abundas: biografio kun portreto de Ruben Dario, kaj specimeno de delikata verseto, lerte tradukita de Angelina Acuña. Tibor Sekelj, la konata samideano, priskribas la landon en bela ĵurnala kroniko, kun la ornamo de kvar mezaj paĝoj kun artaj ilustroj, kiuj estas donaco speciala de la Edukministerio de Gvatemalo al niaj tieaj geamikoj. La fekundaj kampoj de la Nova Mondo sin oferas promesplene al nia plugilo... La ĉarma revuo, kiun mi prezentas, estas jam la unua frukto! BRAZILA ESPERANTISTO amplekse raportas pri sia nacia Kongreso en Recife, kiu estis impona manifestacio pri matureco de nia movado en tiu lando-paradizo. Okazas tie io admirinda: multe da laboro, multe da laborantoj kaj multe da simpatio, flanke de aŭtoritato; kompreneble, la rezulto estas enviinda, eĉ por plej prosperaj eŭropaj landoj. Kiel prave estas, do, ankaŭ por Esperanto, la alnomo, kiun Brazilo ĝuas je lando de la estonteco... Cetere, rigardante la bukedon el kvindek ĉarmaj burĝonoj, kiel fakte aspektas la kvindek lernantinoj, kiuj partoprenis en la kurso gvidata de Prof. Melo e Souza, en Belo Horizonte, oni sentas jam tuj la deziron migri tien, ne atendante la estontecon. PERNAMBUKO ESPERANTISTA denove reaperis, ĉar kvankam: «Ĉiaspecaj malfacilaĵoj devigis nian gazeton al silento, dum tiu tempodaŭro, komence de ĝia malapero ĝis nun, la samideanaro de nia ŝtato neniam konformiĝis je la ideo pri ĉiama dormo de nia revueto». Tial, kun renovigitaj energioj, oni deĵoras sur la posteno. ARGENTINA ESPERANTISTO, denove en presita aranĝo, prezentas frontpaĝe legindan artikolon en hispana lingvo, kie oni pruvas, ke Esperanto estas fakto kaj evidenta realo. Tre interesa estas la Enlanda Kroniko, ĉar ĝi okupas preskaŭ du paĝojn, kun detalaj raportoj, el ĉiuj provincoj, kaj aparta cirkulero pri la venonta Kongreso de la argentinaj samideanoj, tiel multe ŝatataj. Antaŭ ol *forlasi* Amerikon, mi volas mencii la revigliĝon de nia movado en Meksikio, kie la ĵus fondita asocio senĉese laboras, kaj ankaŭ en Kubo, la ravanta insulo, plej ĝentila en ĉiujara saluto al niaj kongresoj. Ĉu S-ro H. Cociña legas regule miajn kroniketojn? Venas la vico nun al Azio, suferanta avino de la homaro; LA REVUO ORIENTA, kiel ĉiam, zorge kaj bele presita, daŭras en sia tasko instrui la lingvon ege detale kaj skrupule. Se la japanaj komencantoj sekvas atente kaj pacience tiujn lecionojn, certe ili fariĝos pli perfektaj esperantistoj ol la eŭropanoj mem. Krom la gramatikaj klarigoj, sciencaj temoj plivalorigas la enhavon de la veterana gazeto, tiel multe ŝatata. Bedaŭrinde, malgraŭ la *piketoj* de kelkaj aludoj miaj, la nomo de nia Bulteno ankoraŭ ne eĉ unu fojon aperis sur ĝiaj paĝoj. Mi enŝovas la fingrojn tra la harojn de mia barbo, cerbumante pri tio, kaj ankoraŭ ne komprenis la kialon... ĉar preskaŭ ĉiuj aliaj japanaj kolegoj plej kamarade rilatas al ni. MEDICINA REVUO estas frapanta atesto pri la kapablo kaj forto de la japana movado en medicinaj rondoj. Sub la zorgo de kompetenta redakcio jam aperis la dua numero de tiu gazeto, kies areo de disvastigiteco ne estas nur Japanio, sed la tuta mondo; plej digne kaj meritoplene, ĉi tiu faka internacia kajero estas kvazaŭ mandato por rajto al gvidanta influo de la orienta esperantismo. La enhavon riĉigas interesaj specifaj artikoloj. Menciante la nomon de mia estimata amiko S-ro Isamu Yamaga, el Hokkaido, en la honora konsilantaro, mi faras omaĝon al tiel grandioza laboro. OOMOTO, jen alia juvelo el nia gazetaro, krom la pura moralo, kiun disradias ĝiaj ideologiaj artikoloj, facile kompreneblaj eĉ por okcidentaj mensoj, ĝi estas vere esperantista revuo pro la bela stilo, el lingva vidpunkto, de tiuj artikoloj kaj pro aliaj ege interesaj pri gramatiko kaj filologio de Esperanto; ili estas idealaj frandaĵoj! SAMIDEANO, fidela al sia nomo, raportas pri la agado de plej viglaj kluboj en Japanio, kun seriozaj informoj pri ĝeneralaj okazaĵoj! LA HORIZONTO, kiel organo de Esperanto-Societo ĉe Agrokultura Fakultato de Nihon-Universitato (Huzisawa) aperas kun iomete pli da scienca enhavo ol la antaŭa kolego, sed same interesa kaj oportuna por konfirmi tiujn miajn asertojn, ke plej simpla esperantisto el okcidento povas esti en intima rilato kun la evoluo de eksperimentoj kaj metodoj de la moderna scienco en la klera lando de la leviĝanta suno. Forlasinte ĝin, per fantazia flugo de la imago, oni ne devas indifente ignori la dolorojn de la malfeliĉa Koreo, kiu, eĉ en mezo de sia tragedio, stoike donas ekzemplon de fervoro kaj obstino al la tutmonda esperantistaro; dise, tra diversaj urboj, en la suda parto, la samideanoj ne perdas kontakton; kaj, eĉ per manskribitaj kajeroj, ili anstataŭas fordetruitajn lernolibrojn. En la ĉina kontinento regule aperas ĉiumonate EL POPOLA ĈINIO kun aktualaj politikaj artikoloj. Suden *vojaĝante*, mi haltas en la edeno de Nov-Zelando, kie niaj tieaj gesamideanoj sin preparas por rendevui, okaze de sia 18ª Kongreso en Auckland, dum lastaj tagoj de kuranta jaro. NEW ZEALAND ESPERANTIST aspektas tre bele kaj gaje, kun densa teksto en angla lingvo, kie oni prezentas koncizajn informojn kaj trafajn argumentojn tre lerte elektitajn. Tiu simpatia folio ĉiam estas bonvena ĉe mi, kvazaŭ orpluma trilanta birdeto.

Tamen, ĉi foje, tiu kanteto avertas pri fino, ĉar spaco mankas. Aŭstralio restas unua en la vico, por prezidi la paradon en la proksime venonta kroniko de

LA LEGEMA KOBOLDETO



El 37.° Congreso Universal de Esperanto celebrado en Oslo (Noruega), ha reunido en magna asamblea a representantes de 35 naciones, que emplearon en sus deliberaciones el Esperanto, como único y exclusivo idioma

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● FRANCIA.—El día 31 de Agosto tuvo lugar la inauguración de la «Casa Cultural de Esperanto» en el Castillo de Gresillon, en Baugé (M. et L.), edificio recientemente adquirido por los esperantistas franceses, como centro veraniego de reunión y celebración de fiestas y solemnidades, así como también de cursos internacionales de Esperanto.

● ITALIA.—«Ente Provinziale Turismo», de Latina, ha editado un folleto sobre esta región italiana, hasta hace poco zona pantanosa, donde imperaba la malaria, y actualmente rica región agrícola; este folleto, ilustrado con plano y fotografías, es de interesante lectura y puede adquirirse gratuitamente de la oficina indicada, a quien debe agradecerse el uso del Esperanto, elegido como medio de mayor difusión para estos servicios informativos.

● SUIZA.—Un folleto ilustrado sobre la localidad de Thun ha sido editado en Esperanto. Puede adquirirse por mediación del señor Fritz Schwartz, Wiesenstrasse, Thun-Bn.

● AUSTRIA.—En la localidad de Worgl (Tirol) y gracias a los trabajos preparatorios del señor Hans Steiner, los días 26 y 27 de Julio tuvo lugar la inauguración del monumento al Doctor Zamenhof. El acto revistió gran brillantez, contando con asistencia de numerosas personalidades llegadas de toda Austria y diversas del extranjero. En nombre del canciller austriaco Dr. Figl, presidió el acto el Jefe del Gobierno de Tirol, Sr. Josep A. Mayr.

El día 17 de Agosto, con ocasión de los 25 años de la fundación de «Internacia Esperanto-Muzeo», de Viena, el Gobierno Federal ha ofrecido un quinto salón, en el antiguo palacio «Hofburg», donde se instalará una exposición de folletos y revistas esperantistas.

Los días 12 y 13 de Septiembre, y durante el Congreso Católico Austriaco, celebraron reuniones los esperantistas católicos, oficiándose la Santa Misa con sermón en Esperanto por el Rvdo. Padre Thalmaier, elocuente orador sagrado, muy conocido y apreciado.

● SUECIA.—«Svenska Esperanto-Tidningen» publica en su número de Septiembre un reportaje con fotografías, sobre el viaje por España de un grupo de esperantistas suecos.

A raíz del reciente Congreso Esperantista en Valencia, se ha observado con satisfacción que la prensa nacional se hizo eco del mismo, publicando crónicas y artículos en pro del idioma auxiliar y de las ventajas del Esperanto.

Sería prolijo dar una relación de los periódicos y revistas en los que han aparecido fotografías, notas y reseñas. Queremos resaltar tan sólo el número de Julio-Agosto del Boletín Oficial de la Organización Nacional de Ciegos, donde aparte de una larga crónica sobre el Congreso, ilustrada ampliamente con fotografías y una información del festival artístico, organizado en Madrid por la «Asociación Española de Ciegos Esperantistas», se publica en primera página un ponderado editorial, resaltando las virtudes del Esperanto como idioma y nexo de comprensión, editorial debido al Excelentísimo Señor Don José Ezquerra, Jefe de la O. N. C. E. activo y entusiasta esperantista, que tan acertadas intervenciones personales tuvo en nuestro Congreso

CURSOS DE ESPERANTO POR CORRESPONDENCIA

Bajo los auspicios de la Federación Española Esperantista han sido organizados estos cursos, tendentes a que cuantas personas se hallen en lugares donde no pueden organizarse cursos verbales, o que no pueden asistir a los mismos, tengan a su disposición un medio garantizado para aprender el idioma auxiliar.

Curso completo en 20 lecciones: 135 pesetas al contado o 150 en tres plazos de 50 pesetas cada uno, escalonadamente. Se entrega el libro de texto, explicaciones y todo el material necesario, incluso los sobres con la dirección impresa.

Todos nuestros afiliados deben difundir este servicio entre sus amistades y familiares

Para detalles, consultas e inscripciones, dirigirse a

Cursos de Esperanto por Correspondencia de la Federación Esperantista Española

Calle Forn, núm. 19 — MOYÁ (Barcelona)

Ricevitaj Libroj

KONGRESA UNIVERSITATO DE 38ª JAPANA KONGRESO 1951. Eldonis Nagoja Esperanto-Societo. 43 paĝoj. Prezo: 0'25 usona dolaro, plus afranko.

De la bela lando de la ĉerizfloroj atingis min ĉi tiu interesa libreto, kiu montras kiel serioza estas la japana Esperanto-movado. La broŝuro enhavas kvar prelegojn de la Kongresa Universitato, okazinta dum la 38ª Japana Kongreso de Esperanto en la urbo Nagoja. La unua titoliĝas: «Esperanto kaj Internaciismo», de S-ro Takasugi-Iĉiro, profesoro de angla lingvo de Ŝizuoka Universitato kaj konata verkisto. La dua estas «Semo Semita», de D-ro Yukito Oota, profesoro de plantfiziologio de Nagoja Universitato. En la tria, S-ro Hasegawa-Riej, profesoro de juro de Kanazaŭa Universitato, sub titolo: «Nova Ordo en Homa Mondo», pledas por nova ordigo jur-politika de homa mondo. La kvara: «Ĉu ekzistas edukado al la feto?», de D-ro Hideo Yagi, profesoro de Akuŝginekologio de Okayama Universitato, estas tre interesa por kuracistoj, pro ties scienca enhavo. Jen havinda libreto, kiu, bele presita sur bona papero, aspektas ĉarme, kvazaŭ delikata porcelano, je honoro de la aktivaj japanaj samideanoj.

Ilia serioza laboro estas ekzemplo, por gajni estimon kaj respekton al nia lingvo en universitatoj kaj sciencaj medioj.

LA BALENODENTO, de Jack London. Tradu is el la angla lingvo William Auld. Formato 12 x 18 cm. 11 paĝoj. Eldonis F. Maitland, 22 Hamilton Park, London N.º 5 (Anglio).
Prezo: 5 pesetoj. Aĉetebla ĉe Libro-servo de H. E. F.

Eldonita de nia simpatia skota amiko S-ro Maitland, ni ricevis por recenzo ĉi tiun broŝuron. Vere ĝi estas tre interesa kaj temas pri la aventuroj de kristana misiisto, inter la kanibala popolo de la Fiĝi-insuloj. La nomo de la tradukinto estas bona garantio pri ĝusteco en la traduko kaj perfekta esperanta stilo. Antaŭ la komenco de ĉi tiu rakonto, troviĝas listo pri tri vortoj ne troveblaj en «Plena Vortaro»: *Degni:* bonvoli fari ion al malaltranguloj, afable, sed tamen sentigante sian moŝtecon. *Devanci:* atinginte lasi post si, antaŭiĝi. *Tripango:* komuna nomo de specoj de holoturioj (maraj limakoj) loĝantaj en certaj tropikaj maroj kaj uzataj en kelkaj orientaj landoj, por fari ŝatatan supon. Mi varme rekomendas ĉi tiun verketon al nia legantaro!

J. JUAN FORNÉ.

LIBERIGO DE TIMO KAJ MIZERO eldonita de Internacia Asocio Bellamy. Koningstraat. 188, Beverwijk (Nederlando).

Bellamy - Asocio celas formi socian strukturon laŭ ekonomiaj kaj sociaj ordoj, klarigataj en la recenzata broŝuro. La Asocio, por disvastigi sian celon tra la mondo, uzas Esperanton kiel internacian lingvon. Por ni, tiu fakto estas la detalo plej rimarkinda kaj tio estus tre plaĉa, ke kia ajn Asocio kun universalaj celoj ankaŭ uzus Esperanton anstataŭ ignori ĝin.

ESPERANTO — Sprache der Volker.

En la serio *Berckers Kleine Volksbibliotek* de «Verlag Butzon & Bercker», de Kevelaer (Rhld.)-Germanio, estas ĵus eldonita ĉi tiu poŝa broŝuro, kiu montras por la germanlingvanoj resumon pri Esperanto kaj ties celo, sciigante la gramatikon, strukturon, vortfaradon, krom kelkajn konversaciajn ekzemplojn. Diversaj listoj de Esperantaj organizoj kaj gazetoj finas la libreton.

MESAĜO

LA NOVA MONDO KAJ ESPERANTO

Jen du broŝuroj eldonitaj de «Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko», memorigaj pri la 13ª Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Recife dum pasinta Februaro. La unua estas apelado al ĉiea fratema homo; kaj, per la dua, Brazila Instituto alvokas la Organizon de la Amerikaj Ŝtatoj por la alpreno de Esperanto, kiel instrumento de rilatoj inter la ŝtatoj, favore al la popola kulturo. La alvokon subskribas 49 eminentaj gebrazilanoj, nome de iliaj respektivaj organizoj; kuraĝiga ekzemplo, kiu montras la altvaloran koncepton, kiun oni pri Esperanto havas en tiu bela sudamerika lando.

PLANTEPATOLOGISKE LABORATORIUM «J. E. OHLSENS ENKES»

Atingis nin la 15ª kaj lasta jarraporto de ĉi tiu Plantpatologia Laboratorio, sub la gvidado de D-ro Paul Neergaard, kies teksto danlingva estas klarigata per resumoj angle kaj esperante. Krom la valoro apliki en scienca verko Esperanton, estas interesa la terminaro en listo de fakaj vortradikoj, bezonataj por kompletigi la enhavon de Plena Vortaro.

La volumo estas havebla interŝanĝe kun simila eldonaĵo ĉe «Esperanto-Foreningen for Danske Akademikere», Laksegade, 33, Box 136 - Kobenhavn K (Danlando).

ERNESTO HURTADO.

UN BUEN OBSEQUIO *para vuestros amigos y corresponsales del extranjero es el número extraordinario del Congreso, que puede adquirirse a 5 pesetas ejemplar. Si se nos mandan las direcciones, lo expediremos directamente, corriendo a nuestro cargo el franqueo.*

☆ LA LERNEJO

E. P. en Barcelono. — Oni ne povas uzi same «kio ajn» kiel «io ajn». Ekzistas inter ambaŭ esprimoj la sama diferenco kiel inter «kio» kaj «io». Mi montros al vi kelkajn ekzemplojn. «Li scias nenion pri io ajn». «Pri kio ajn li scias ion?» «Donu al mi ion ajn por trinki». «Kion ajn vi deziras trinki?» Kara amiko, vi skribis al mi tre kortuŝan leteron, kiun mi tre sincere dankas, kaj se mi ankoraŭ ne respondis ĝin, la kaŭzo estas ke mi sidas en laboro, ĝis super la oreloj. Elkoran saluton!

M. R. M. en Castellón.—En la prononcado de la vortoj ***kvankam, kvar, kvin, kvitanco*** estas nenia dubo, kiel vi komprenos. Kaj rilate tiujn vortojn, kiuj havas la literojn KV en la mezo, la regulo estas la sama, sed oni ne povas eviti, en rapida elparolado, diri ekzemple: «a-dek-va-ta» anstataŭ «a-de-kva-ta»; kaj «an-tik-va» anstataŭ «an-ti-kva». Ne petu al mi pardonon pro viaj demandoj, mi ŝatas ilin kaj ankaŭ viajn leterojn. Kiel oni povas vidi sur la lasta BOLETIN, vi scias tre bone vin loki, kiam fotografistoj uzas siajn kamerojn. Amikan saluton! **JUAN BOSCH**

PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a OCTUBRE 1952)

Suma anterior	4.239 Ptas.
Comité Organizador del XIII Congreso Español de Esperanto en Valencia.....	1.500 »
Total	5.739 »

He aquí un bello final de nuestro Congreso.

LOTERIA NACIONAL

La Federación Esperantista Española ha adquirido para el próximo Sorteo de Navidad (22 de Diciembre de 1952) el billete entero, las seis series completas, del

Núm. 43.614

a cuya participación están invitados todos los esperantistas y simpatizantes. Para información y encargos, así como para toda clase de envío de dinero, referente a este asunto, dirigirse al Depositario:

EMILIO PRADES - Derechos, 39 - Valencia

AVISO.—Cuando pasado el tiempo prudencial para la llegada de un número, éste no se haya recibido, rogamos se nos comunique seguidamente el extravío.

POŜTKARTOJ KUN LA PORTRETO DE BEATA PAPO PIO X

U. E. C. I. (Unio de Italaj Katolikaj Esperantistoj) ĵus eldonis poŝtkartojn kun portreto de la Beata Papo Pio X. Protektanto de la Esperantistoj, kaj tre bela aprobita preĝo en Esperanto.

Oni povas mendi ilin al la Sekretario de U. E. C. I., S-ro RENI, Via Rovereto, 6, VERONA (Italio)

2 ekzempleroj: unu respondkuponon, aŭ la sama valoro en memorigaj neuzitaj poŝtmarkoj de via lando, ankaŭ per monbiletoj.

Por pli ol 20 ekzempleroj rabato estas konsentita

ANONCETOJ

Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatos al nia afero. Unu peseto au unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoncoj.

S-ro FELIX RUIZ, calle Carles, 27, bajo (Avenida del Puerto) — Valencia deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo

Tri meksikaj esperantistoj deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo. Skribu al S-ro Felipe Zamora S., General Anaya, 27-15, México 1, D. F. (Meksiko)

24 - jaraĝa germana samideano deziras korespondi kun samaĝa aŭ pli juna samideanino pri filmteatro, sporto, vojaĝoj, Esperantomovado, speciale li interesiĝas pri la hejmlando de sia korespondantino, S-ro Werner Sturm, Spiehlerweg, 3 Memmingen (13 b), Germanio

22 - jara inspektoro de instruado deziras korespondi kun hispanoj pri ĉiuj temoj. Skribu al S-ro Janakio Janakiev, ul. Cani Gintĉev 1009 gr. Leskovetz (Bulgario)

OOMOTO

La bela japana gazeto estas nun abonebla en Hispanio

Jarabono: 45 pesetoj.

Petu senpagan provekzempleron!

Landa peranto: **J. JUAN FORNÉ** - Martí, 3- Valencia

DICCIONARIO ESPERANTO - ESPAÑOL

de Balech y Menéndez

Precio: 20 pesetas

Libro-servo de Hispana Esperanto-Federacio

Hernán Cortés, 18 - VALENCIA

KUL

Imp. PERIS - Gran Vía Marqués Turia, 28 - Valencia